

Svisa Esperanto-Societo informas

2000 numero 2-a: marto / aprilo

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude GACOND

Svisa Esperanto-Societo kunlabore kun Lucerna Esperanto-Societo invitas vin al la **SES-Tago 2000 en Lucerno** je la sabato 8a de aprilo Ĝenerala Kunveno kaj pliaj eventoj **Hotelo Waldstätterhof, Zentralstrasse 4** (apud la stacidomo okcidente)

Programo:

- 11h00 Publika inform-evento germanlingve
sub la gvido de Bruno Graf kaj de Nicole Margot.
- 12h30 Tagmanĝo.
- 14h00 Ĝenerala Kunveno de SES**
- 16h00 Vizito de la ĵus renovigita Boubaki-Panoramo.
- 18h30 Adiaŭa rondo.
Dum la paŭzoj distros vin muzikanto.
(Detalaj informoj sur la paĝoj 3a kaj sekvaj)

Ĉe niaj najbaroj

Strasbourg Francio

Praktika Staĝo de parolata esperanto

Sabaton 1-an kaj dimanĉon 2an de aprilo okazos kultura semajnfino, kiun ni vigle konsilas al la studemaj svisoj. Ĝi okazos en la centro CIARUS 7, rue Finkmatt, FR-67000 Strasbourg, atingebla de la stacidomo per la busoj 10 aŭ 20, haltejo "Place de Pierre"

Programo

Sabaton 1an de aprilo:

13h30: Akcepto.

15h00 -18h00:

Infanoj: ludoj kun C. GALLEGO.

Plenkreskuloj:

A. Komencantoj kun E. LUDWIG.

B. Praktikantoj kun E. GROSSMANN.

C. Konversacia kurso kun P. DENIS kaj A. HUBERT.

D. Seminario **Esperanto radiografiita** kun Claude GACOND.

18h00: Libroservo kaj esperanta muziko kun JEFO.

19h00: Vespermanĝo.

20h30: Koncerto de Môrice BENIN, kiu kantas unuafoje 2 aŭ 3 kanzonojn en esperanto!

Dimanĉon 2an de aprilo:

8h30: Matenmanĝo.

9h00: Daŭrigo de la ludoj por infanoj kaj de la kursoj kaj seminario.

12h30: Komuna tagmanĝo.

Interesatoj petu detalan informilon rekte al Claude GACOND.

Germanio

Printempa Semajno Internacia en St. Andreasberg (Harz)

17-24 aprilo

Informas Wolfgang BOHR, Johannes-Kirschweg-Strasse 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler (Germanio). Retpoŝto: psi@esperanto.de.

Katalunujo

La **8a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo** okazos de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro en la urbo Blanes, provinco Girona (Katalunujo). Por ricevi informojn: HFEA, Apartado 15027, ES-08080 Barcelona (Hispanujo). Retpoŝto: luis_serrano@mixmail.com.

Kiel skribis al ni Carlo NICOLODI en Allschwil, tiuj nun tradiciaj katalunaj esperanto-semajnoj fariĝis ŝatataj kulturaj aranĝoj.

SES-Tago 2000 en Lucerno

Publika inform-evento 11h00-12h00 de la 8a de aprilo

Kutima jam estas la rendevuo por aktivuloj, kiu okazos ĉifoje kiel publika inform-evento. Esperantistoj restas tro ofte en propra rondo. Ni organizu pli da rendevuoj por aŭ kun eksteruloj por konigi nian lingvon.

Tiu ĉi inform-evento havos du celojn. Ĝi montros al eksteruloj, kio esperanto estas aŭ ne estas. Kaj por samideanoj la evento povos esti modelo pri aranĝo de informa horo. Tiel eble lokaj grupoj trovos kuraĝon por agi pli publike.

Tagmanĝo en la senalkohola restoracio Waldstätterhof (menuoj pagotaj surloke)

- 1) **3-plada menuo**
CHF 27.-
Tomatsupo aŭ salato.
a) bovidaĵo b) fisajo c) veg. legom-
steko.
Rizo.
Brokolo.
Fruktosalato aŭ kremajo.
- 2) **Ĉef-plado**
CHF 18.-
a) bovidaĵo b) fisajo c) veg. legom-
steko.
Rizo.
Brokolo.
- 3) **Ĉef-plado kun supo**
CHF 22.-
Tomatsupo.
a) bovidaĵo b) fisajo c) veg. legom-
steko.
- 4) **Ĉef-plado kun deserto**
CHF 23.-
a) bovidaĵo b) fisajo c) veg. legom-
steko.
Fruktosalato aŭ kremajo.

Aliĝkotizoj al la tuta SES-tago 2000:

Plenkreskuloj po CHF 18.-

Studentoj kaj JES-anoj: CHF 12.-

Kotizo libervola por la SES-membroj, kiuj partoprenos nur la Ĝeneralan Kunvenon.

La kotizon bonvolu pagi antaŭ la 27a de marto al la poŝta ĉekokonto 60-10745-9 per la aldonita enpagilo.

La aliĝilon bonvolu sendi al Louise BACHMANN, Rütistr. 8, 6032 Emmen.

Tagordo de la Ĝenerala Kunveno 14h00-16h00

1. Komunikoj de la prezidanto.
 2. Elekto de la voĉnombrantoj.
 3. Protokolo de la lastjara jarkunveno de la 15a de majo 1999 aperinta en *SES informas* 1999-3.
 4. Jarraporto 1999 (paĝoj 5a kaj 6a).
 5. Jarkalkulo kaj bilanco 1999 (paĝo 7a)
Raporto de la kaskontrolantoj (paĝo 8a)
Buĝeto 2000 (paĝo 7a).
 6. Reelekto de la estraro.
 7. Propono de Esperanto-Societo Zürich pri malaltigo de la kotizoj ekde 2001 (paĝo 26a).
 8. Proponoj de Dieter ROOKE pri kreo de servo por vidbendoj, radioprogramoj kaj gazetinterŝanĝoj, ktp. (paĝo 9a)
- Diversaĵoj.

Tranoktebloj

por tiuj, kiuj ŝatus alveni vendrede kaj/aŭ resti ĝis dimanĉo

Hotelo Waldstätterhof Tel. 041 210 54 93 Fakso 041 210 09 59 <hotelwaldstaetterhof@bluewin.ch>	1-lita ĉambro CHF 130.-	2-lita ĉambro CHF 166.-	Aŭto-parkado CHF 10.-
Hotelo Steghof Voltastr. 2, 6005 Luzern Aŭtobuso 4/5 (CHF 1.70) Tel. 041 360 43 43 Fakso 041 360 77 81	1-lita ĉambro CHF 75.-	2-lita ĉambroCH F 120.-	Aŭto-parkado senpaga

La prezoj inkluzivas la matenmanĝon.
Bonvolu mem rekte mendi vian hotel-ĉambron.

**Se vi bezonas helpon
aŭ por ĝui distradon vendrede aŭ dimanĉe**

kontakto Paul SCHERER, Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke. Tel 041 280 46 12.

SES: Jarraporto 1999

La **Estraro** konsistis el 5 membroj:

Bruno GRAF, prezidanto

Perla MARTINELLI, vicprezidanto

Barbara POCHANKE, kasisto

Anĝelo MELLINI, sekretario

Nicole MARGOT, franclingva reprezentanto.

Fine de 1998 Nicole BEROUDEJ retiriĝis de la estraro. Demisias fine de la trijara mandato la kasisto kaj la sekretario.

En la **laborgrupo pri varbado** kunlaboras:

Germanlingva teamo: Bruno GRAF, Sonja BRUN kaj Patrick RENTSCH.

Franclingva teamo: François RANDIN, Christiane SIXTUS kaj Jean-Thierry VON BÜREN.

Kunsidoj kaj kunvenoj: La estraro kaj la laborgrupo pri varbado kunsidis po dufoje dum sabato en Bern.

Laborkunveno 1999.03.06 en Bern pri la situacio kaj perspektivo de esperanto en Svislando. D-ro Tazio CARLEVARO prezentis studon *Ĉu esperanto postvivos la jaron 2045?* Perla MARTINELLI komentis la pozitivajn faktorojn dum Bruno GRAF faris analizon kaj skizis eblan strategion. Partoprenis 12 personoj.

SES-Tagoj 1999 majo 15-16 en Zürich, Akazienstrasse 6. Esperanto-Societo Zürich kaj gesinjoroj WEIDMANN akceptis nin en sia nova moderna laborejo kaj sidejo. La programo estis varia kaj interesa: Rendevuo por aktivuloj kun raporto de la laborgrupo pri varbado, ĝenerala kunveno, prelego de Zlatko TIŠLAR el Maribor pri la Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo, literatura muzika bufedo kun Jan Stanislaw SKORUPSKI kaj muzikistoj. Partoprenis 25 personoj.

Regiona kunveno 1999.10.23 en Genève, kie prelegis Claude PIRON pri esperantaj kaj psikologiaj temoj. Rekorda partopreno de 40 personoj.

Informado kaj varbado

La interna informado tre bone funkcias danke al la bulteno *SES informas*, kiu aperis kvinfoje. La prezidanto rilatas kun la lokaj grupoj per cirkuleroj. La grupoj de Genève, Lausanne, Basel kaj Zürich eldonas propran informilon.

La ekstera informado ne sufiĉas pro manko de kunlaborantoj. Ne eblis restarigi la gazetaran servon, kvankam okazaĵoj ekzistas. Ni ripetas la

alvokon por kolekti gazetartikolojn pri esperanto kaj pri la lingva problemo sendendajn al la prezidanto.

Niaj celtavoloj estas la instruistaro kaj la junularo. Tial ni serĉas la kunlaboron kun Svisa ILEI-Sekcio. Por kontaktoj kun la redakcioj de SLZ (*Schweiz. Lehrerzeitung*) kaj *Educateur* ni sukcesis aperigi tripaĝan artikolon pri esperanto verkitan de Mireille GROSJEAN. Samtempe ni faris reklamon per gazetanoncoj. Ankaŭ se la reagoj estas modestaj, ni certe povis influi la instruistaran medion.

La ideo de la agotagoj 1999 estis vendigi ion rilate al esperanto. La koncepto antaŭvidis atentigon per afiŝo pri la germlingva gvidilo *Esperanto Wort für Wort*, Kauderwelsch Band 56, Verlag Peter RUMP. Helpe de Rolf ERNST ni kreis kaj eldonis 200 afiŝojn por pendigo en librovendejoj kaj magazenoj, kie esperantistoj estas klientoj. En la regiono Basel, Bern kaj Luzern tiu afiŝo estis sendita ankaŭ al lernejoj. Plej multajn afiŝojn, nome 37, fiksigris Esperanto-Societo Luzern, kiu ricevos la premion de CHF 100 promesitan de la SES-estraro.

La prezidanto petis konsiladon de fakulo pri komunikado. Tiu ĉi opinias, ke nia buĝeto ne ebligas reklami per radio aŭ televido. Li rekomendas organizi eventojn por altiri interesatojn kaj ĵurnalistojn. La laborgrupo pri varbado spertis, ke intereso pri esperanto apenaŭ ekzistas. Tial ni devas icel provoki, koncentrigi la fortojn en urbo aŭ regiono kaj agi samtempe tra diversaj vojoj. La laborgrupo ekzamenis tekstojn por gazetanoncoj kaj intencas lanĉi la ideon lerni esperanton per interreto. Dietrich WEIDMANN ricevas regule retroŝtaĵojn de personoj, kiuj informiĝas pri esperanto, de tempo al tempo ankaŭ SES, ekzemple de gimnazianoj, kiuj elektis esperanton por ekzamena laboro.

Ni daŭrigis la varbadon de membroj kaj abonantoj, sed tio estas sizifa laboro. Eksiĝoj pro aĝo aŭ nepago de kotizo malhelpas kreskon. Tamen ni gajnis dekon da abonantoj kaj kelkajn novajn membrojn. Potencialo restas la 250 personoj, kiuj anas en lokaj grupoj, sed ne al SES? Ili ofte ne estas aktivaj kaj ne reale konscias pri la rolo de SES, kiu same kiel sindikato defendas la interesojn de la movado.

Fine de la trijara mandato ni povas diri, ke ni modernigis la eksteran bildon de nia societo, altigis la aktivecon per iniciatoj kaj puŝis la varbadon. Ni dankas al ĉiuj, kiuj persone kunlaboris aŭ subtenis nin finance.

La prezidanto: Bruno GRAF

Jarkalkulo kaj bilanco 1999 kaj buĝeto 2000

JARKALKULO	Buĝeto 99	Kalkulo 99	Buĝeto 00
Membrokotoj	7'500.00	6'596.00	6'500.00
Abonoj (sen membreco)	200.00	350.00	400.00
Donacoj	1'200.00	1'206.82	1'100.00
Donacoj Agado 2003, enspezoj	1'500.00	1'440.00	500.00
Interesoj CS-ZH, GEP 98+99, malnetaj	900.00	959.85	1'000.00
Enspeza sumo	11'300.00	10'552.67	9'500.00
INFORMADO, PUBLIKAJ RILATOJ			
Informado, varbado	4'000.00	2'532.25	3'000.00
Omagoj, laborrimedoj	50.00	57.50	50.00
Subvencioj, premioj por ideoj, projektoj	1'000.00	41.30	1'000.00
Elspezo	5'050.00	2'631.05	4'050.00
SERVOJ			
Literatura Foiro, Heroldo	0.00	0.00	4'800.00
SES Informas	2'000.00	2'529.60	2'500.00
Kunvenoj (GK)	600.00	203.00	600.00
Elspezo	2'600.00	2'732.60	7'900.00
ADMINISTRADO			
UEA - Kotizo	250.00	210.00	250.00
Administrataj kostoj	2'800.00	2'292.90	2'300.00
Bankspezoj, diversaj	200.00	199.42	200.00
Elspezo	3'250.00	2'702.32	2'750.00
Elspeza sumo	10'900.00	8'065.97	14'700.00
Gajno / Malgajno	400.00	2'486.70	-5'200.00

BILANCO		Aktivoj	Pasivoj
GEP, konto 079		0.00	
UBS KCE Favore SES		15'000.00	
Inventaro		1.00	
CS-ZH, zinsstuf. Sparkonto (653677-40-2)		30'065.55	
CS-ZH, Kuranta Sparkonto (653677-40)		8'040.40	
CS-ZH, fonduso Agado 2003 (653677-40-1)		10'258.80	
Varbsumo disponebla ĉe C. Gacond		127.20	
CS-ZH ant. Imp. Bonhavo ĉe ESV		280.55	
Transaj eroj, aktivaj kaj pasivaj			265.00
Kapitalo je 99.01.01	61'021.80		
Gajno	2'486.70		
Kapitalo je 99.12.31	63'508.50		63'508.50
		63'773.50	63'773.50
REZERVA KAPITALO (CS-Winterthur)			
CS-WI, sparkonto (596219-70)		9'351.25	
CS-WI, ant. Imp. Bonhavo ĉe ESV		35.00	
Rezerva kapitalo je 01.01.99	10'242.30		
Plus interesoj malnetaj	111.95		
Minus favore AG2003 + girspezoj	-1'003.00		
Rezerva kapitalo je 31.12.99	9'351.25		9'388.25
		9'388.25	9'388.25

B. Pochanke, kasistino, 12.02.2000

Raporto de la kaskontrolantoj

La subskribintoj Dieter Rooke, Oensingen kaj Paul Scherer, Emmenbrücke, kunsidis sabate, la 12an de februaro 2000 en la hotelo National en Bern, por kontroladi la librotenadon kaj la ĉi-rilatajn dokumentojn de la jarkalkulo 1999 de Svisa Esperanto-Societo. Ĉe-estis la kasistino Barbara Pochanke kaj Elisabeth Lauper kiel antaŭvidita nova kasistino.

Ni certigis nin pri la ĝusta transskribo de la saldoj el la antaŭa jarkalkulo, kontrolis la laŭordan enskribon de en- kaj elspesoj en 1999 surbaze de la ekzistantaj pruviloj kaj komparis la unuopajn kontosaldojn.


La bilanco montras al ni gajnon de fr. 2'486.70, do pli ol 2000.- pli ol la buĝetitaj fr. 400.-. Ĉi-tion ĉefe kaŭzis la neelĉerpita sumo por informado / verbado. La kapitalo altiĝis al fr. 63'508.50.

En la Rezerva Kapitalo ankoraŭ troviĝas fr. 9'351.25. Ĝi malaltiĝis je fr. 891.05 ĉefe pro pago al la Agado 2003.


Ni, la kas-kontrolantoj povis kun ĝojo konstati, ke la librotenado estas en ordo farita. Tial ni proponas al la Ĝenerala Kunveno, aprobi la jarkalkulon kaj la bilancon 1999 kaj malŝarĝi la kasistinokaj la estraron. Al la kasistino Barbara Pochanke kaj al Elisabeth Lauper, kiu komputile tajpis la finajn sumojn, ni sincere dankas pro la granda kaj ne facila sed bone plenumita laboro dum la tuta jaro.

Bern, la 12an de februaro 2000.

La kas-kontrolantoj:



Paul Scherer



Dieter Rooke

Emmenbrücke, 18.2. 2000 /schp
SES-rev/win

Vivo de SES

Proponoj de Dieter ROOKE

Citajoj el la letero, kiun Dieter ROOKE sendis al la SES-prezidanto Bruno GRAF je la 15a de februaro:

Laŭ alvoko en *SES informas* 2000-1, mi faras jenajn proponojn al la Ĝenerala Kunveno:

Disponigi al SES-anoj TV-programon, t. e. vidbendojn, kiuj estas surmerkate en esperantio. SES pagu la kotizon ekzemple al la Vidbenda Servo Herzberg en Germanio. Ankaŭ ekzistas stoko da vidbendoj ĉe KCE kaj Laŭzana Esperanto-Societo.

Disponigi al membroj radio-programon. Mi mem regule aŭskultas la radioprogramon de Varsovio, sed ankaŭ interesas min programoj el Bejing, Svedio, ktp.

SES ofertu almenaŭ perkorespondan kurson.

Laŭ lastjara prelego la interreta kurso estas tro mallerte farita. SES nepre engaĝiĝu en ties plibonigo.

Servo de gazetinterŝanĝoj: SES disponigu al membroj laŭplaĉe gazetojn malnovajn. Ekzemple mi posedas grandan kvanton da periodaĵoj, kiujn mi interŝanĝas.

Neniu membro estu devigata aboni LF-on.

La kotizoj estu adaptitaj al la servoj. Ekzemple duobligo de la kotizo.

Ĉu eblas uzi interreton anstataŭ la normala poŝto? La SES-oferto interreta donu aliron al la membroj por komuniki internacie.

Ni zorgu pri niaj idoj per organizo de rondo familia.

Dieter ROOKE

Koncepto pri kreota Esperanto-Amikaro

La 27an de novembro 1999 Claude GACOND kaj Bruno GRAF diskutis en Neuchâtel pri projekto krei kaj informi Esperanto-Amikaron. Temus pri interesuloj, kiuj iel simpatias al esperanto, sed ne necese lernus la lingvon. SES havas intereson ligi libere tiajn personojn al nia movado, ekstere de statuta konsidero, por esti ĉirkaŭita de subtenantaro.

Tiucele SES eldonos naci-lingvajn informfoliojn po dufoje jare por lingvo. La franclingva portos la titolon *L'Essor de l'espéranto*, la germanlingva *Brief an Esperanto-Freunde*. Jare ni eldonos enpagilon por libervola donaco. Claude GACOND redaktos la francan eldonon espereble kun

kunlaborantoj, same Bruno GRAF la germanan, iu eventuale transprenos la redaktadon de itallingva folio. La unuaj numeroj eldoniĝos jam en 2000.

Claude GACOND havas stokon da adresoj kaj intencas sisteme kolekti ĉe CDELI pliajn kaj konservi ilin komputile. Li ankaŭ pretas organizi la dissendon de la informiloj. Ni petos al la grupoj kaj al la membraro sendi al ni la adresojn de simpatiantoj.

Ŝparemo postulas kontroli la agadon. Tial aperos regule talono, per kiu ricevanto povos haltigi la ricevon aŭ peti pliajn servojn.

Multaj bultenoj de esperanto-asocioj aperas en esperanto kaj nacilingve. Tiel procedas la asocioj en unulingvaj landoj, kiel Germana Esperanto-Asocio, kaj ankaŭ ofte la lokaj grupoj. Sed en plurlingva federacio kiel Svislando ni devas redakti nian informilon *SES informas* nur en esperanto. Sed ni povos informecel aldoni al ĝi la nacilingvajn foliojn por simpatiantoj.

La prezidanto kaj redaktoro.

Rondo familia

Por mia 11jara filo mi serĉas kunulon prefere nekrokodileman por libertempi. Ekz. skiadi, sledi, naĝi. Telefonu al: 062 396 01 86.

Berna Renkontiĝo de la 12 februaro por debati pri la projekto de Esperanta Civito

Nicole MARGOT interrete mesaĝis al mi sian impreson pri la berna renkontiĝo per tiuj ĉi vortoj, kiujn mi centprocente aprobas: *«Mi estis tre kontenta pri la hieraŭa debato, kiu pruvis, ke esperantistoj kapablas konfronti ideojn, eĉ iom dispute, sen okazigi tertremojn en la movado.»*

Cele al la redaktado de la protokolo pri tiu grava berna debato, mi detalege registris ĉiujn intervenojn kaj petis al Giorgio SILFER fari la samon. La ci-sekva raporto rezultas do el kunigo de ambaŭ protokoloj. Tiu ĉi kunlaboro redakta estas garantio de objektiveco.

Claude GACOND

Detala protokolo de la diskutoj

Malfermaj vortoj

Malfermante la kunvenon en ĉesto de dudeko da partoprenantoj, per kiuj ĉiuj esperanto-grupoj funkciantaj en Svislando estas reprezentitaj, Bruno GRAF anoncis la senkulpiĝon de d-ro Alfred WENGER, kaj li alvokis al reciproka aŭskultemo favore al

diskuto, kiu ne fariĝu disputo. Gravas, ke ĉiu provu kompreni la aliajn. Li dankis al Bruno MASALA, kiu akceptis veni el Metz por advokati kontraŭ Giorgio SILFER, al kiu li tuj transdonis la parolon.

Prezento de la dokumentoj

Giorgio SILFER enkonduke prezentis la kadron de la diskuto. Temas pri 3 dokumentoj: la **Kvintezo**, la **Pakto** kaj la **Projekto de Karolovaro**.

En 1997 Esperanta PEN kaj ERA kunvokis la unuan Forumon de la Esperanta Civito en La Chaux-de-Fonds, kiun organizis KCE kaj gastigis CDELI. Aliĝis entute 25 establoj, sed la voĉdonon pri la finaj dokumentoj en la dua tago partoprenis nur 15 el ili. La finaj dokumentoj estis la **Pakto por la Esperanta Civito** kaj **2 rezolucioj**. El ĉi-lastaj, unu priskribas la taskojn de la **Evolukomisiono**, la alia inkluzivas la Kvintezon. La Pakto mem estas kontrakto inter liberaj establoj (kolektivoj, ne individuoj), kiuj decidis krei sinergion inter si, agnoski komunan arbitracian instancon kaj formi la kernon de dezirinda Esperanta Civito. Ĉi-lastaj estas do la fina celo de la Pakto, kiu validos en la nuna formo nur ĝis la ekesto de la Civito.

La forumintoj decidis troviĝi unu jaron poste por dua Forumo, kiu ekzameni la proponon de **Konstitucio**. Tio okazis fakte fine de julio 1999 en Karolovaro (Ĉeĥio), kie estis aprobita la konstitucia projekto, submetota al la libera diskuto de la esperantistaro. La berna kunveno favoras tiun diskuton.

Diskuta momento

Claude GACOND rimarkis, ke ĝenerale la planlingvoj estis prezentataj nur kiel helpa komunikilo. Nur esperanto disvolvis aliajn funkciojn de arta perilo kaj de identigilo. Ĝuste tial ĝi ne mortis, sed daŭre progresas. La tuta projekto de la Civito ŝajnas respondi al nuna ĝenerala bezono vidi en esperanto realan identigilon aldone al la dimencio de helpa lingvo por la internaciaj rilatoj. Giorgio SILFER esprimis sian aliĝon al tiu ĉi rimarko.

Kritikoj de Bruno MASALA

Sekve ricevis la parolon Bruno MASALA. Konstatinte la ekziston de dualismo, li sin demandas, ĉu indas malgraŭi ĝin, aŭ prefere ĝin utiligi. Ĉu elekti aŭ ne elekti inter finvenkismo kaj raŭmismo? Li rimarkis, ke malmultaj esperantistoj opinias, ke esperanto estas nur helplingvo. Laŭ li, tamen neniu kontraŭas la ideon mem, ke esperanto estas «la lingvo de la esperantistoj». Li krome sin

demandas, ĉu estas oportune celi al strukturigo de tiu identiga flanko. Ĉu nia identeco estas socia, popola, politika, kultura aŭ ideologia, idealisma, espera, religia, kultura?

Bruno MASALA trovas, ke ekzistas pri la Civito problemoj de komunikado. En politikaj konceptoj necesas reale konvinki, se oni volas sukcesigi siajn ideojn. Pormomente la sindetenado de la esperantistaro rilate al la civita projekto estas ĝenerala, dum kritikoj kaj atakoj venas ĉefe el personaj malamikoj de Giorgio SILFER, kiuj estas bedaŭrinde multaj.

Bruno MASALA poste demandas sin, ĉu la konstruo de Civito kontraŭas al la esperantisma idealo. Demandite de Giorgio SILFER, kion signifas «la esperantisma idealo», li respondis: «La interna ideo de Zamenhof, kiun poste aktualigis Ivo LAPENNA per la koncepto de humaneca internaciismo.»

Plie Bruno MASALA opinias, ke la socia bazo de Esperantio estas fora de la ideo de la Civito, tamen li aldonis ke, kiel leĝodonanto kaj prestiĝodonanto, la Civito povus esti tuj tre efika, interalie ĉe rilatoj kun instancoj eksteraj al la esperanto-movado.

Li ankaŭ forte dubas, ĉu, en mondo kiel la nuna, eblas proponi ian «ŝtatecan» strukturon, sed ali-

flanke li agnoskas, ke nuntempe ĉiuj organizaj strukturoj tendencas ŝanĝiĝi. Ni vivas en formiĝanta Eŭropa Unio kaj en mondo, kiu unuiĝas. En tiu kunteksto estas normale, ke ankaŭ en la esperantistaro sentiĝas bezono je pli adekvataj strukturoj.

Fine al Bruno MASALA ne plaĉas la ideo starigi propran arbitracian instancon.

Reagoj de la SES-prezidanto

Por inaŭguri la debatan diskuton Bruno GRAF poste sin esprimis kiel prezidanto de SES, kiu dubas pri la aktualeco mem de la projekto, sed samtempe respektas kaj admiras la arkitektojn de la Civito. Ili esprimas novan vojon.

Bruno GRAF trovas la projekton interesa intelekta fikcio, sed fakte nur vizio, aŭ utopio. Li opinias, ke esperanto bedaŭrinde stagnas, ke la esperantistaro kvante malkreskas kaj li timas, ke la iniciatintoj de la projekto moviĝas mense en fora esperantista mondo. Li konsentas pri la Kvintezo. Pri la Pakto mem li ne ŝatas, ke ne eblas facile retiriĝi el ĝi. Krome li malŝatas la polemikojn, en kiuj cetere ĉiam kuŝas risiko tro grandigi la proprajn eventojn. Tio sentiĝas en la dokumentoj favoraj al la Civito.

Revenante al la Konstitucia Ĉarto, Bruno GRAF trovas la modelon teorie bona – sed, ĉu realigebla? Li ne sukcesas trovi

kandidatojn por la Estraro de SES: kie do trovi kandidatojn por la Senato ktp. Tio riskas esti nur ŝajnorganizo.

Fakte la «civitismo» estas jura kaj politika sistemo, tute nova aliro al organizita Esperantio, sed laŭ la prezidanto de SES la tempoj ne estas maturaj, kaj pormomente landa asocio kiel SES ne bezonas la proponitan Pakton, ĉar ĝi jam estas ligita al UEA.

Debato

Nicole MARGOT ankaŭ aprobas la Kvintezon, sed ne la Pakton. Ŝi sin demandas, ĉu la Civito naskiĝos kun la tuta esperantistaro aŭ nur en grupeto.

Judit FELSEGHY (membro de la Evolukomisiono de la Pakto) atentigis, ke la naskiĝonta Civito ne estas ankoraŭ realaĵo plene difinita, sed same kiel bebo estas parte divenebla, parte ne, en la ventro de la patrino; kelkaj karakterizaj trajtoj de la Civito estas jam klaraj, dum aliaj dependos de la debato dum la du venontaj jaroj. Tial ĉiuj demandoj kaj kritikoj estas bonvenaj, kaj ŝi gratulis al la Estraro de SES pro la kunvoko de ĉi tiu debata kunveno.

En la kantono Neuchâtel Claude GACOND estis parlamentano kaj ankaŭ li aktivis en la politika vivo de la komunumo La Sagne. Li atentigis, ke la popola medio ne facile komprenas la leĝofaran teknikon, la jurecan sintenon kaj

la lingvaĵon de la politikistoj. Ŝajne ankaŭ okazas sama problemo ĉe la esperantistaro rilate al la argumentado porraŭmismo kaj porcivitismo. Ekzistas ne nur antaŭjuĝoj ideaj, sed ankaŭ vigla alergia pri la jurisma lingvaĵo de Giorgio SILFER.

Lucien DAHAN demandis, kiuj konkretaj kritikoj ĝis nun ekzistas pri la Konstitucia projekto.

Giorgio SILFER respondis, ke ne multaj. Estis drasta plendo de s-ro BEHRMANN el Berlino pri la uzo de la termino «Esperantio» anstataŭ «Esperantujo». Tiu lia kritiko estas submetita al la Akademio de Esperanto, kiu partoprenis en ambaŭ Forumoj per reprezentanto.

Estis plendo, kiun faris ankaŭ Nicole MARGOT, pri la insigno de la Civito, sed montriĝis, ke la plendintoj konfuzas la flagon kun la blazono. La insigno devenas de la blazono, kiu estas tute originala.

Kunkluda respondado

Bruno GRAF anoncis, ke alvenis la momento konkludi la debaton per transdono de la parolo al Giorgio SILFER por konkluda respondado al ĉiuj ricevitaj kritikoj.

Responde al la diversaj rimarkoj de Bruno MASALA, Giorgio SILFER unue sin esprimis pri la dualismo: finvenkismo kaj raŭmismo, kiuj estas polusoj kun mal-

sama naturo. Por li la raŭmistoj konsideras ĉiujn finvenkistojn kiel parton de la esperanto-komunumo, dum la finvenkistoj (speciale post Prago, 1996) tendencas ne konsideri la raŭmistojn kiel parton de la movado. Alivorte: la organiza modelo de la finvenkismo postulas disciplinon laŭ hierarkia akso, por esti efika premgrupo ĉe la eksteraj institucioj – ju pli ni estos, des pli ni premos. Ĉe la raŭmistoj, ju pli ni estas, des pli ni realigas nin. Do la raŭmistoj ne spitas la dualismon, dum la finvenkismo rifuzas ĝin.

Se malmultaj esperantistoj opinias esperanton nur helplingvo, tio signifas, ke la raŭmistoj estas pli nombraj ol oni kredas. La temo estas serioza: granda estas la diferenco inter la du asertoj – «Esperanto estas internacia helplingvo» kaj «Esperanto estas la lingvo de la esperantistoj». La dua aserto privilegias la esperantistaron kiel heredanton kaj gardanton de nia kultura pasinteco. La unua ne. La demando estas sociolingvistike grava.

Al Bruno MASALA, kiu sin demandas, ĉu indas celi strukturigon de la identigila flanko, Giorgio SILFER respondis: «Dependas de la organiza modelo». Ni devas ĉi tie emfazi, ke la Pakto ne estas asocio, sed kontrakto inter liberaj establoj.

Kaj la Civito ankaŭ ne estos asocio, sed senteritoria subjekto de internacia juro. Valoras ĉi tie menciigi la ekzemplon de la Maltaj Kavaliroj. Ili estas nur dektrimil en la tuta mondo, sed ĉirkaŭ ili moviĝas milionoj da homoj.

En tiu strukturigo, grava etapo, laŭ Giorgio SILFER la plej grava, estas la starigo de komuna kondukto. Kial heziti pri arbitracia instanco? Bruno MASALA aludis al malamikoj de SILFER. Ĉu li ne scias, ke unu el la postuloj de la cirkulero de Miguel FERNANDEZ en 1996 estis ĝuste tiu? Jen la citaĵo: “5. - *Konsideras utila la eblon ke estonte kreiĝu, interne de Esperantujo, profesia rekomenda juĝ-instanco (en konekso kun EJA), al kiu oni povus sin turni okaze de tiaj konfliktoj, se oni deziras levi al strikte jura nivelo plendon aŭ akuzon pri aferoj okazintaj en nia kulturmedio kaj en la internacia lingvo...*”.

Giorgio SILFER konsideras, ke liaj malamikoj estas inteligentaj, sed ne koheraj, kaj eĉ ne ruzaj, ĉar iliaj atakoj neniam superas la personan nivelon. Li ankoraŭ atendas de ili veran politikan kontraŭproponon. La UEA-prezidanto ENDERBY (kiu tute ne estas malamiko) faris tian proponon. Giorgio SILFER estimas lin pro lia kapablo politike kontribui al la debato.

Bruno MASALA parolis pri komunikaj problemoj. Tiurilate Giorgio SILFER atentigis, ke havi komunan lingvon ankoraŭ ne signifas havi komunan opinion pri la koncepto homo. Kaj al li ŝajnas, ke la Kvintezo estas nuntempe la plej aktualigita priskribo de la koncepto pri la homo, kiun ni trovas ĝuste ĉe Zamenhof.

Al la demando de Bruno GRAF pri la malfacileco retiriĝi el la Pakto, Giorgio SILFER respondis, ke la ekziĝo estas same (mal)facila kiel la aliĝo: Same kiel ne sufiĉas pagi kotizon (kiu cetere ne ekzistas) por eniri la Pakton, ne sufiĉas momenta kaprico por forlasi ĝin. La aliĝo al la Pakto pasas tra la aprobo de la absoluta plimulto de la paktintaj establoj, kaj la retiriĝo pasas tra verdikto de la Kortumo (la arbitracia instanco), al kiu la retiriĝo sin turnas.

Giorgio SILFER dankis al Bruno GRAF pro la aprezo pri la Konstitucia Ĉarto. Ĝia realigo, kiel ĉiam, dependos ankaŭ de la homoj. Sed li atentigis, ke ekzistas ankaŭ la nehaltigebla fluo de la historio. Ni citu lin:

«Kiom da homoj en somero 1989 antaŭvidis la falon de la muro de Berlino? La 25an de junio 1991 la lasta sovetia soldato foriris de Hungario: ankoraŭ kelkajn monatojn pli frue, la plej entuziasmaj hungaroj prognozis

tion por 1998 aŭ eĉ poste, ĉar la tempoj ne estis maturaj...»

Rilate al la bezonoj de landa asocio, al kiu laŭ Bruno GRAF sufiĉas esti ene de UEA, Giorgio SILFER komentariis, ke se ekzistas establo, kiu bezonas aliĝi al la Pakto, tiu estas ĝuste la nuna UEA. Fakte UEA suferas pro la manko de vere federalisma strukturo, kaj tion ĝi suferas de post 1933. Se la formulo de la Esperanta Civito estus aplikita al UEA, la propono de prezidanto ENDERBY estus realigebla. Ni citu lin:

«Ĉu vi imagas hodiaŭ, ke Ĉina Esperanto-Ligo, laŭ la strategio de ENDERBY, pledus favore al la homaj rajtoj en Tibeto? Se UEA estus en la Pakto, la esperanto-civitanaro mem decidus, ĉu havi aŭ ne politikon favoran al la homaj rajtoj – kaj tio estus la politiko de la Civito, sen ajna kompromito interna al UEA! Fakte la projekto de Karolovaro realigas la federalisman formulon, kiun ni de longe bezonas en Esperantio.»

Giorgio SILFER fine konkludis per lasta rimarko al Bruno MASALA, kiu en sia interveno deklaris sin kristano. Li tiel provis komprenigi la novecon de la civita projekto. Ni ree citu lin:

«La Esperanta Civito donas novan formulon kaj novan sencon al la kristaneco kaj esperantisteco

ene de homo. Ĝis hodiaŭ la kristana esperantisto aktivas por varbi novajn kristanojn inter la esperantistoj kaj por konvinki la katolikan eklezion (se li estas romkatoliko) pri la taŭgeco de esperanto kiel solvo de la lingva problemo interne al la eklezio.

Morgaŭ la esperanta civitano kaj kristano daŭre aktivos por disvastigi la vorton de Kristo en Esperantio, sed samtempe, en la eklezio, metos la akcenton sur alian prioritaton: la kristanaj esperantistoj estas la homa grupo, kiu sukcesis aktualigi la pentekostan miraklon – kaj ili volas ĉiuj dependi de unu sola episkopo, ne por izoli sin, sed por pli efike atesti la realigon de tiu miraklo.»

Fermo de la debato

Bruno GRAF fermis la debaton per dankoj al Giorgio SILFER kaj al Bruno MASALA kaj al ĉiuj aliaj ĉeestantoj kaj ankaŭ pro la reciproka respektemo, kiu daŭre esprimiĝis dum la tuta mateno. Estis bone, ke tiu ĉi debato okazis antaŭ la Ĝenerala Kunveno de SES.

Tiu detala raporto baziĝas sur la protokoloj de Claude GACOND kaj Giorgio SILFER

Posttagmeza prelego de Bruno Masala

La posttagmeza prelego de Bruno MASALA pri la temo «Tutmondiĝo kaj kulturo» ankaŭ grupigis dudekon da partoprenantoj (pluraj aliaj ol dum la mateno), kiuj aktive intervenis en la diskuto, kiun la preleganto alvokis.

Claude Gacond

Pruntoservo koncerne la revuon Babylonia

Ekde la jaro 1999 SES abonas la revuon *Babylonia*. Ni ekkonis ĝian ekziston pere de la numero 1 de 1998, kie aperis studo de Tazio Carlevaro: «*Les Espérantophones suisses*». Tiu svisa revuo pri «*Instruado kaj lernado de la lingvoj*» estas eldonita en Tiĉino de «Fondazione Lingue e Culture». Ĝi aperas en la kvar svisaj lingvoj. Tio signifas, ke la redaktora artikolo estas tradukita en la kvar lingvojn. Sed la aliaj artikoloj en unu el la svisaj lingvoj estas sekvata de resumo en iu alia. Ĉiu revuo proksimume 80-paĝas.

Tiu fondumo ankaŭ proklamis «*Manifeston favore al la Lingvoj*». Mi citu parton el ĝi: «Ni

aliru la novan miljaron kun aperteco kaj kompetento en la lingvoj.

Necesas plilarĝigi niajn lingvokononajn kaj nian komprenon de alies kulturoj.

Necesas akcepti, ke Svislando estas plurlingva societo.

Necesas rimarki kaj valorigi, en tiu lingva kaj kultura diverseco, tion, kio nin unuigas.

Necesas konsenti pri vivkutimoj variaj kaj respekti la minoritatojn.

Necesas lerni konstruan aliron al la konfliktoj kaj al la interesoj diverĝaj.

Necesas por la kolektivoj kaj por la individuoj, feliĉe vivi en Svislando, en Eŭropo kaj en la mondo.»

La Manifesto proponas do utiligi ĉion por certigi lingvan kaj plurlingvan edukon laŭ tiuj principoj, tre parencaj al la esperanta idealo, ĉu ne? (Se mi ne eraras). Tial SES, samtempe kiam ĝi abonis la revuon, ankaŭ subskribis la Manifeston.

Tiun ĉi Manifeston vi povas ricevi de Fondumo Lingvoj kaj Kulturo, poŝtfako 120, 6946 Comano. ☎ kaj fakso: 091 941 48 65.

Por ke tiuj revuoj, ege interesaj, kun temoj science traktitaj, profitu al ĉiuj niaj membroj, ni decidis organizi pruntoservon. Se vi deziras prunte ricevi numeron, vi sendu koverton je formato A4 kun surgluita poŝtmarko de CHF 2.-

(la tarifo baldaŭ ŝanĝiĝos!), kaj kun via adreso al: Nicole Margot, Lys 4, 1010 Lausanne. Mi proponas, ke la prunto daŭru 2 semajnojn (mi indikos la limdaton sur la revuo). Tio signifas, ke se la interesatoj multas, vi devos mal-feliĉe pacienci, kaj ĉiumaniere respekti la limdatojn, por ke la servo funkciu. Se artikolo aparte interesas vin, kial ne verki artikolon por *SES informas*? Tiel ĉiuj profitos kaj kleriĝos pri diversaj aspektoj de la plurlingvismo.

Jen la listo de la nun disponeblaj revuoj kun ties temoj:

1998-1: *Aspektoj de plurlingvismo.*

1999-1: *Eŭropa lingvo «foliaro».*

1999-2: *Plurlingva edukado.*

1999-3: *Franca lingvo. CH-lingvo, literaturo, kaj kulturo en Svislando.*

Mi esperas, ke tio interesos vin kaj atendas viajn pruntopetojn.

Nicole Margot

Dieter ROOKE, Äussere Klus 2, 4702 Oensingen, deziras interŝanĝi vid- kaj son-bendojn surrogate al naciaj elsendoj. Volonte li pruntedonos radio-elsendojn de Varsovio, Sarajevo, Havano, Trilanda regiono de Bazelo. Krome li ofertas aliajn sonbendojn de pluraj aŭtoroj.

Movada vivo

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro
pri la Lingvo Internacia

Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
☎ 032 967 68 55.

Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

Pro feriaj kaŭzoj CDELI estos
fermita de la 7a ĝis 19a de aprilo.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Svisa ILEI Sekcio

François Randin: prezidanto
Vallombreuse 14, 1004 Lausanne
☎ kaj fakso 021 647 29 17

Retpoŝto: <ilei.ch@esperanto.nu>

Didaktikaj Studsabatoj

La studsabato de la 19a de
februaro ĉe CDELI grupigis
ĉirkaŭ Claude GACOND 8
esperanto-instruantojn kaj stud-
emulojn el La Chaux-de-Fonds,
Genève, Neuchâtel kaj Saules. La
mateno estis dediĉita al la
participa sistemo de esperanto kaj
la posttagmezo al paroligaj
ekzercoj.

Ĉiuj studemuloj (komencantoj,
progresantoj, instruantoj) notu, ke
principe Claude GACOND estos
senkoste je ilia dispono la 3an
sabaton de la monato en la

CDELI-salono ekde la 9h00 ĝis la
17h00. La studo disvolviĝas de la
10h00 ĝis la 12h30 kaj de la
14h00 ĝis 16h00. Tagmanĝo
okazas en najbara italeca
restoracio. Eblas aĉeti librojn el la
brokanta servo de CDELI je tre
moderaj prezoj.

Jen la datoj de la venontaj stud-
sabatoj, al kiuj ĉiuj studemuloj
estas bonvenaj:

Marto 18: matene strukturŝanĝaj
ekzercoj cele al gramatika lertiĝo ,
posttagmeze paroligaj ludoj cele
al leksika riĉiĝo.

Aprile: feria paŭzo.

Maje 20: Ni havos la unikan
ŝancon ĝui la viziton de Ed
Borsboom el De Bilt (Neder-
lando), fakulo pri la esperanto-
literaturo kaj tre agrabla kaj
humurplena preleganto. Kun li
ni konatiĝos kun valoraj nun-
tempaj verkistoj. Ne maltrafu
tiun ĉi unikan stud-rendevuon,
kiu estas larĝe malfermita ne
nur al la kutimaj frekventantoj
de la studsabatoj, sed ankaŭ al
ĉiuj interesatoj pri la originala
literaturo en esperanto. Por
kovro de elspezoj estos petita
partoprenkotizo de po CHF 10.-
por partoprenanto.

Junie 17: 1) Ĉiuj partoprenantoj
estos invitataj prezenti 5-minutan
prelegeton pri temo memelektita;
2) sekvos diskutoj pri la koncernaj
temoj kun la prelegintoj. 3)
Lingvaj ekzercoj celos lertiĝon

rilate al gramatikaj aŭ leksikaj mallertajoj rimarkitaj dum la koncernaj prelegoj kaj diskutoj. Aŭskulto de registraĵo objektivigos la situaciojn.

K.C.E.

**Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.**

☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.

Retpoŝto:

<kce.esperanto@bluwin.ch>

Raporto

**Kurso de François DEGOUL
pri la temo**

«Kio estas bona poemo?»

Dekon da poemoj la preleganto legis kaj petis de la kursanoj juĝi ilin laŭ plaĉo instinkta. Kompreneble poste la poemoj estis detale analizitaj laŭ ties historia kunteksto, ĝenerala signifo, sinsekvo de la ideoj, ritmo. (Ĉu la leganto tuj sentas ĝin?)

Beleco de versaĵo rezultas el harmonio, klara strukturo, kiam la ritmo kongruas kun la muziko de la lingvo: amfibrakoj aparte konvenas al esperantaj versoj, ekzemple: «*Al vi ho potenca sen-*

kora mistero» (- ^- / - ^- / - ^- / - ^-).

Dank' al klarigoj de la preleganto kaj diskuto inter la partoprenantoj la signifo kaj beleco de pluraj esperantaj poemoj estis portataj al alta komprennivelo.

Finfine la unua ĝenerala impresado de bonkvalitaj versaĵoj konfirmiĝis ĉe la konkludo, ke niaj poetoj estas tute certe bonaj, kelkaj eĉ unuarangaj.

Antaŭ unu monato d-ro Giorgio SILFER skizis altnivelan prezenton historian kaj komparan de interlingvistiko.

Kaj la 25-26ajn de marto MARĈEK klarigos, kiel kuraci sin per plantoj.

Jean-Thierry VON BÜREN

Venontaj aranĝoj

Marto 25-26: Stano MARĈEK (Slovakio): Kuraci sin per plantoj. + mezgrada studrondo + vespero kun ges-roj ROBINEAU.

Aprilo 15-16: Asembleo de KCE kaj Omaĝo al Yvonne MARTINOT per aro da prelegoj pri literaturo, historio, sociologio, didaktiko kaj muziko.

Majo 27-28: Ĉina semajnfino kun gastoj de Ĉina Akademio de Sciencoj.

Junio 24-25: Zofia BANET FORMALOWA: zamenhofologia semajnfino dediĉita al la familio Zamenhof + teatra vespero.

Ni memorigas, ke ekde la pasinta jaro la apogantoj de KCE ricevas detalajn sciigojn pri la aktiveco de KCE per rubriko publikigita en *Heroldo de Esperanto*.

Universala Esperanto-Asocio

Sonja BRUN, ĉefdelegito kaj kongresperanto por Svislando.
Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz.
☎ 041 790 46 40.
Retpoŝto: <smbrun@freesurf.ch>

Aperis la dua bulteno pri la 85a Universala Kongreso en Tel-Aviv (25 julio ĝis 1 aŭgusto), kaj mi esperas, ke la aliĝintoj ĝin ricevis.

Laŭ tiu ĉi bulteno la kongreso iĝas pli kaj pli alloga. La kongresa temo «*Lingvo kaj kulturo de paco*» estas certe tre aktuala. Tel-Aviv kaj ties ĉirkaŭaĵo havas multon por proponi, kaj la gamo da ekskursoj, la antaŭ- kaj post-kongresoj estas tre variaj kaj multflankaj. Estas ankoraŭ tempo por aliĝi. La kotizo ĝis fine de marto restas po CHF 221 por UEAmembro kaj po CHF 110 por junulo. La tranoktaj prezoj estas inter Euroj 89 kaj 39 en 2-lita ĉambro hotela kaj Euroj 13 en junularloĝejo. Menciindas, ke Esperanto-Societo Zürich aranĝas grupojaĝon (16a de julio ĝis 1-a de aŭgusto).

Sonja BRUN.

Grupa vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en Restoracio
Weiherhof, Neuweilerstr. 107

Monataj kunvenoj

Marto mardo 14: Renkontiĝo ĉe Claraplatz antaŭ SBG je la 19h30: "Gugge und Gässle".

Marto 23: Vizito de la Internet-Centro DataComm ĉe Steinentorstr. 11 je la 20h00.

Bern

Esperanto-Societo Bern

Prezidanto: Daniel Ruchti

Kontaktadreso: Ueli Haenni, Linckweg 2,
Postfach, 3052 Zollikofen.

☎ 031 911 64 72

Kunvenoj: Ĉiunonate la unuan mardon je
19h30 en Restoracio «Al Forno»,
Spitalgasse 37, Bern.

Per mesaĝo de Ueli Haenni kaj Simona Rossi apogita de Margrit Guldin, Hans Herrmann kaj Daniel Ruchti, nia redakcio estis informita, ke ankaŭ en Bern regule kunsidas grupo da esperantoparolantoj. Tial kun ĝojo ni aperigas ankaŭ la nomon de

Esperanto-Societo Bern inter la lokaj grupoj kun regula esperanto-aktiveco. Niaj bernaj samideanoj sin esprimis iom riproĉe per tiuj ĉi vortoj:

«*Karaj gelegantoj de «SES informas», ni, kiuj ricevas nian «SESi»-n en kaj ĉirkaŭ Bern, ofte legas kun intereso pri la aliaj lokaj grupoj. Sed ni ŝatus ankaŭ legi pri ni mem, kiel aliaj grupoj legas pri siaj lokaj grupoj. Sed vane ni serĉadas.»*

Kaj ili anoncas la datojn de siaj venontaj kunsidoj. Nian silentadon rilate al la vivo de Esperanto-Societo Bern neniel rezultas el volo ne menciigi ĝin, sed el nura kaŭzo: ke ĝis nun neniuj sciigoj pri tiu ĉi aktiveco atingis la redakcion de *SES informas* aŭ la arkivejon CDELI!

Datoj de la venontaj kunvenoj

Nia renkontiĝejo troviĝas en la angulo por nefumantoj de la restoracio «Al Forno» ĉe la Spitalgasse 37, kiu situas je malpli ol 5 minutoj piede de la berna ĉefstacidomo. Tie renkontiĝas ĉiumonate la duan mardon ekde la 19h30 eta, sed ĉarma aro da esperantistoj. Notu en via poŝkalendaro la datojn de la venontaj renkontiĝoj:

Marto 07; Aprilo 04; Majo 02; Junio 06, Julio 04.

Margit Guldin, Hans Herrmann, Daniel Ruchti kaj Ueli Haenni

La Chaux-de-Fonds

Studa rondo ĉe CDELI

Ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND aŭ alia instruanto

Raporto

La merkredaj kunvenoj regule grupigas 5 ĝis 10 progresantojn kaj komencantojn, kaj babilante, ludante, aŭskultante prelegetojn ĉiuj pli kaj pli lertiĝas en la parola praktiko de esperanto.

Datoj de la venontaj kunvenoj

Marto 8 kaj 22.

Aprilo marde 25.

Majo 10 kaj 24.

Junio 14 kaj 28.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monatkunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des gares, Genève

Raporto

La januara *Brasikfolio* 2000-1 per la plumo aŭ tajpilo de Anita ALTHERR interese raportas pri la prelego «*Vojoj al bona interkompreniĝo*», kiun Mireille GROSJEAN prezentis la 4an de januaro antaŭ dekduo da stelanoj. Resumo de la koncerna teksto verŝajne instigos aliajn grupojn ankaŭ inviti tiun pedagoginon, kiu

instruas la francan kaj germanan kaj ankaŭ la civitanan edukadon en Le Locle. Per klasaj interŝanĝoj ŝi donas la okazon al alĉmanaj gclernantoj vivi en romandaj familioj kaj inverse. Renkontoj ankaŭ okazas en komunaj loĝejoj. Tiuj kontaktoj kun familioj aŭ klasoj alilingvaj kondukas al novaj spertoj klerigaj kaj al la ekzerco de la lernataj lingvoj.

Antaŭ tiuj renkontiĝoj la lernantoj ricevas kelkajn lecionojn pri konflikto-solvado. Ekkonscio pri la propraj antaŭjuĝoj ebligas ilin mildigi. Tiu instruo celas al psika ekvilibro kun emo al interhomaj kontaktoj; al pacienco; al scivolo kaj malkovremo de alies kutimoj.

Kiuj kapablas interkompreniĝi, tiuj havos malpli da antaŭjuĝoj kaj pli da fleksebleco, kiam alvenos la momento trovi laborlokon.

Kiel konkludis Anita ALTHERR, la stelanoj aprezis la prelegon de Mireille GROSJEAN pro ĝia interesa enhavo kaj ankaŭ pro ŝia bela esperanto-elparolo.

Bela festo honore al Mad MEVO

Laŭ telefona komuniko Anita ALTHERR informis, ke dudeko da stelanoj grupiĝis la dimanĉon 20an de februaro por honori Madeleine STAKIAN. Kortuŝe multaj parolis memorigante pasintaĵojn kaj ankaŭ Mad MEVO mem sin esprimis. Granda kuko

kun ŝia nomo estis frandita de ĉiuj kaj Anita ALHERR lumbilde rakontis pri la esperanto-vivo en Genève ekde 1963 ĝis la lastaj jaroj, kaj ĉiuj miris, al kiom da renkontiĝoj havis la okazon partopreni la stelanoj. Ĉiuj estis kvazaŭ refreŝigitaj sentante, ke esperanto reale havas historion eĉ je loka dimensio.

Monataj kunvenoj

Marto 7: Ĝenerala Asembleo kun iom tikla tagordo: Elekto de Komitato aŭ statuta malfondo de «*La Stelo*».

Almenaŭ la redaktoro de «*SES informas*» esperas, ke la societo retrovos novan gvidantaron kaj ke tiel la sekvaj kunvenoj povos okazi laŭ la antaŭvidita kalendaro: Aprilo 4, Majo 2 kaj junio 6.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

Ø: (021) 729 58 02

E-mail: <lausanne.ch @ esperanto.nu>

Homepage: <<http://www.esperanto.ch>>

Kunveno: Stacidomo, 1-a etaĝo, 20h30

Diskuta rondo: ĉiumonate je la tria lundo en hotelo Continental : 18h00-20h00.

Monataj kunvenoj

Marto 6: paroligaj ludoj kun Claude GACOND.

Kaj rezervu la sekvajn datojn:

Aprilo 3, Majo 8, Junio 18:

Ekskurso. Aŭtune la renkontiĝoj

okazos je la 4a de **septembro**, 2a de **oktobro**, 6a de **novembro** kaj 10a de **decembro** kun **Zamenhofa festo**.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
☎ 041 280 46 12.

Kunvenoj: ĝenerale ĉiun trian jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

Raporto

La Ĝenerala Kunveno de Lucerna Esperanto-Societo (LES) kutime okazas dum la karnavala tempo kaj tiun ĉi jaron ne estis escepto. Grandnombre kaj bonhumore la LES-anoj kunvenis la 18-an de februaro en salono de la restoracio Emmenbaum en Emmenbrücke, nia kutima kunvenejo, kiun Margit SCHERER bunte ornamis.

Paul SCHERER, la prezidanto, en sia jarraporto povis retrorigardi pozitive al la societa jaro. Okazis 8 monataj kunvenoj kun paroliga kurso kaj poste fare de niaj membroj prelego aŭ kontribuo pri temoj antaŭe fiksitaj. Okazis ankaŭ 2 ekskursoj bedaŭrinde sub

la pluvo pro la malbona somera vetero, sed ni ĉiuj jam de longe resekiĝis! Sed pri la vetero ne devis zorgi la partoprenantoj de la ĉiumonataj babilrondoj posttagmezaj, kiujn gvidas Franz BRÜGGER, ĉar ili okazas komferte en kafejo.

La varbado, per la interretaj hejmpaĝoj dediĉeme prizorgataj de Anĝelo MELLINI kaj per la agotaga afiŝkampanjo, portis kelkajn fruktojn. La gazeto *Neue Luzerner Zeitung* dediĉis tutan paĝon al esperanto kaj al la lingvoproblemoj. Pluraj mezlernejoj de diversaj establoj petis informmaterialon. La plej videbla konkreta rezulto estis broŝuro kaj prelego sub la titolo *Esperanto und das Plansprachenphänomen* de studento en la kantona mezlernejo, kiu estis multe priatentita de instruistoj kaj studentoj laŭ la informo de la preleginto. Krome LES-anino estis invitita paroli pri esperanto en la Rudolf STEINER Lernejo kadre de la franclingva instruo.

Post tiom da kuraĝigo la LES-anoj pretas por plua agado kaj antaŭenrigardas kun intereso al la efiko, kiun havos la varbklopodoj kadre de la venonta SES-tago.

Ankoraŭ raportindas, ke la kassistino Renata FILALI demisiis post 6-jara dejorado. La koncernan librotenanadan funkcion transprenis Louise BACHMANN.

La vespero finiĝis en agrabla etoso per muzika distro tir-harmonika de Paul SCHERER.

Sonja BRUN.

Venontaj kunvenoj

Marto 16 je la 14h00: Ludoj kaj enigmoj kun Franz BRÜGGER.

Aprilo 8: LES ricevos SES-n por ties Ĝenerala Kunveno. Kaj **la 27an je la 20h00:** Sciindaĵoj pri kantado, muziko kaj instrumentoj kun Paul SCHERER.

Majo 18 je la 20h00: Kun Monika RUCKLI travivaĵoj kun ĉevaloj kaj azenoj.

Junio 15 je la 20h00: Kio kaj kiaj estas vespertoj kun Annelies DETTLING.

Julio 8: Ekskurso kun Louise BACHMANN.

Aŭgusto 24: Promenado kun Sonja BRUN.

Septembro 21 je la 20h00: Konsiloj de samaritanino kun Margrit SCHERER.

Oktobro 19 je la 14h00: Edukado de infanoj en esperanto kun Dieter ROOKE.

Novembro 16 je la 14h00: Kompilo de la programo 2001 kun Paul SCHERER.

Aldone je ĉiu unua merkredo de la monato okazas paroliga kunveno kun Franz BRÜGGER inter la 14h00 kaj 16h00 en la restoracio Big Ben, Winkelriedstrasse 39. Venontaj datoj: aprilo 5, majo 3,

junio 6, julio 5, septembro 6, novembro 8, decembro 6.

La publikigo de tiu programo 2000 instigu kelkajn kontakt- kaj vojaĝemulojn al renkontiĝo kun LES-anoj.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. ☎ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Pri la kluba vivo

Dum la Ĝenerala Kunveno de la klubo la 2an de februaro estis elektita nova estraro, kiu konsistas el Stanislaw POCHANKE: prezidanto; Verena CHAVES-WALDER: vicprezidanto. David POCHANKE: sekretario kaj Emil FORRER: kasisto.

Monataj kunvenoj

La ĉi-sekvaj kunvenoj komenciĝos per duonhora paroliga konversacio gvidata de Barbara POCHANKE.

Marto 1: Ludovespero kun L. SENNHAUSER.

Aprilo 5: Kun S. POCHANKE: 1. Raporto pri la kunveno pri Esperanta Civito. 2: Postuloj por la Ĝenerala Kunveno de SES.

Majo 3: Vojaĝ-impresoj tra la okcidenta Usono fare de B. S. POCHANKE, kun lumbildoj.

Junio 7: Prelego de T. WADOLOWSKA, el Pollando.

Julio 5: Ekskurso al Nieselberg (Neulanden) kun B. POCHANKE.

Septembro 6: Raporto pri la Universala Kongreso.

Oktobro 4: Temo elektota.

Novembro 8 (dua merkredo): Elektitaj lumbildoj pri svisaj regionoj kun Ernst GLÄTTLI.

Decembro 6: Nikolaa vespero kun B. POCHANKE, V. CHAVES-WALDER kaj L. SENNHAUSER.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH ☎ 01 251 50 25

Kunvenoj: 19h15, Akazienstrasse 6,
8008 Zürich

Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de la 14 februaro 2000

Partoprenantoj: Elisabeth EISENEGGER, Vreni ELSNER, Ernst GLÄTTLI, André HERMANN, Alice KESSLER, Martin MEYER, István MOROCZ, Dieter ROOKE, Lydia ROTH, Armin WEIDMANN, Dietrich WEIDMANN, Nelida WEIDMANN-GONZALES, David YAKI kaj la infanoj Jasmin kaj Linda WEIDMANN.

Bonvenigo: La prezidanto listigis la novajn membrojn aliĝintajn en 1999: Leni Erica GUT, André HERMANN, Stephan MEIER, Michael MUELLY, Ana Maria RANGEL, Jasmin WEIDMANN (infano), Linda WEIDMANN (infano), David YAKI, Betina ZEHNDER.

En la sama periodo ESZ perdis pro forpaso sian honoran membron Hanny LIECHTI kaj s-inon STÜCHELI. Eksiĝis pro sia aĝo kaj malbona sanstato Edith LÖSCH.

ESZ entute havas 54 membrojn.

Lastjara protokolo: Ĉar ĝi ne estis retrovita, tial ĝia akcepto estis ŝovita al venonta monata kunveno.

Jarraporto de la prezidanto: Tiun raporton la membroj ricevis kun la invito al la kunveno. En ĝi la prezidanto emfazas la unuopajn atingojn, precipe ankoraŭ foje rakontas pri la efiko de la sukceso de la grupo Freundeskreis kun la kanto *Esperanto*.

Kasraporto: La kasisto havis la ĝojigan informon, ke la societo faris profiton de CHF 10'885.65 malgraŭ diversaj eksterordinaraj elspezoj varbcelaj. Tiun gajnon ni dankeme ŝuldas unuflanke al malavara donaco de CHF 10'000 de Hans KÄSTLI cele al varbado en gazetoj. Krome ESZ ricevis testamentaĵon de s-ino HAUPTMANN. La kasisto sam-

tempe anoncis, ke li disponigos sian oficon kaj ke Elisabeth EISENEGGER, la ĝisnuna kas-kontrolantino, pretas transpreni la funkcion de kasisto. Ŝi raportis, ke la kasraporto estas bonorda.

Sensarĝiĝo: La raportoĵ estis akceptitaj kaj la estraranoj sensarĝitaj.

Elektioj: Decidiĝis elekti 5 estraranojn. La 4 ĝisnunaj estraranoj pretis denove akcepti mandaton, sed Dieter ROOKE tamen ne plu kiel kasisto, kaj Elisabeth EISENEGGER pretis transpreni la kason. Havante 5 kandidatojn por 5 postenojn la membraro decidis unuanime ilin bloke elekti. Kiel novaj kaskontrolantoj estis elektitaj Armin WEIDMANN kaj Vreni ELSNER.

Laborplano: Post longa diskuto akceptiĝis ampleksa laborplano, en kiu estas decidite, ke okazos du kursoj por komencantoj, ke stariĝos stando la 2an de septembro kaj ke okazos instru-semajnfino la 23-24ajn de septembro kun Claude GACOND, semajnfino kombinita kun kultura aranĝo orientsvisa.

Subteno al KCE: Estis unuanime akceptite subteni KCE-n per regula pago de CHF 200 jare.

Societa kapitalo: Estis donita unuanime al la estraro la kompetenteco okupiĝi kaj decidi pri rentodona investo de la societa kapitalo.

Buĝeto: La membraro decidis, ke la buĝeto kongruu kun la lastjara jarkalkulo, sed ke la elspezoj por varbado estu altigitaj je CHF 3'000 (anstataŭ 2'000), kiel proponis la estraro per 3 kontraŭ 2 voĉoj kaj 6 sindetenoj.

Diversaĵoj: Decidiĝis ne disdoni la adresaron al la membraro. Rilate al la membro-karto la tasko estas redonita al la estraro por plua esploro.

SES: La membraro unuanime decidis rezolucion al la Ĝenerala Asembleo de SES, pro konstato, ke el la 54 membroj de ESZ nur 12 estas membroj de SES, ĉefe pro ĝia tro alta kotizo. Tiu rezolucio proponos, ke la SES-kotizo estu malaltigita al CHF 35.

Je la 22h30 la kunsido estis fermita kun kafo kaj kukoj.

Protokolis Dietrich M. WEIDMANN kaj Nelida WEIDMANN-GONZALES.

Raporto Monataj kunvenoj

Ni renkontiĝas ĝenerale je la 20h00 la duan lundon monate en la Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

Komenciĝos novaj esperanto-kursoj la 4an de marto kaj la 7an de oktobro.

Esperanto-Librejo Zuriko



Subtenu Esperanton akirante Viajn ne-esperantajn librojn tra ni !

La reguloj de la svisa eldonista kaj librovendista asocio ne permesas al ni vendi al niaj membroj librojn kun rabato. Sed tiuj reguloj ja ne malpermesas al ni subteni kun la profito la Esperanto-movadon. Tial la **Esperanto-Librejo Zuriko transpagos estonte 5% de la vendosumo al la Svisa Esperanto-Societo kaj la saman sumon**

al la Esperanto-Societo Zuriko (esceptitaj estas Esperanto-libroj, kiuj mendeblas nur tra nekomercaj kanaloj kiel UEA kaj tial ne povas esti akiritaj kun komercista rabato). Do se estonte vi deziras akiri iun ajn libron (**ne nur Esperanto-librojn**), simple notu verkiston, titolon, eldonejon, eldonjaron kaj ISBN-numeron sur mendilon, kiun vi sendos al ni, kaj post kelkaj tagoj vi ricevos la libron kun fakturo. Por mendo super 100.- frankoj vi krome ne devos pagi la sendokostojn! Per via pago vi subtenas la Esperanto-movadon. Se konsekvence la Esperantistoj en Svislando estonte akiros siajn librojn (francajn, germanajn, italaajn ktp.) tra ni, SES kaj ESZ jare ricevos belan subtensumon! **Ajna libro liverebla en ordinara svisa librovendejo estos akirebla tra ni!**

☞ **Libro-mendilo** (kopiu, plenigu, kaj sendu al Esperanto-Librejo Zuriko • PF 858 • CH-8034 Zuriko Fax 01-261 04 79 • RP info@esperanto.ch)

Verkisto	Titolo	Eldonejo	ISBN-Numero

(minimumaj indikoj: Verkisto kaj titolo)

Persona nomo:

Familia nomo

Adreso

PK/Loko

Per mia subskibo mi devigas min pagi la librojn tuj post ricevo kaj deklaras, ke mi pretas kaj kapablas pagi. La prezoj estas la oficialaj prezoj de la svisa libro-komercio. Por mendoj sub 100.- pagendas la sendokostoj. 5% de la fakturprezo estos flanke de la Esperanto-Librejo Zuriko donotaj al SES kaj la sama sumo al ESZ.

Dato kaj subskribo

Vojaĝu kun ni al la 85a Universala Kongreso en Tel-Aviv (25an julio - 1-an aŭgusto 2000). Ni planas komunan vojaĝon de la 16a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2000. La programo enhavas rondvojaĝon tra Israelo al la Morta Maro, Jerusalemo, la Lago de Galileo kaj la bahaaj sanktejoj en Hajfa.

Nia programo enhavos flugon, rondvojaĝon kaj hotelojn. Al la kongreso mem, ĉiu devos mem aliĝi. La prezoj por somero 2000 ankoraŭ ne estas konataj, tial ni povos finpretigi la aliĝilon por la vojaĝo nur en marto. La prezoj estos inter CHF 2000 kaj 3000 por persono, inkluzive ĉion krom la kongreskotizo. Se vi volas profiti je la plej malalta kongreskotizo, tiam jam aliĝu al la Universala Kongreso sen atendi nian definitivan vojaĝproponon.

Revojaĝo al Kubo

Kiel simpla abonanto de la komunista gazeto *«Internaciisto»* mi eksciis pri la Konferenco de Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo okazonta en Havano (Habana), la ĉefurbo de Kubo, kaj ĉar mi havas leteramikon en Santiago de Cuba, tio pliiĝis mian deziron reviziti la landon de la 75a Universala Kongreso de Esperanto, kiun mi partoprenis en 1990. Pri ĝi mi memoros por ĉiam.

Neniam mi leviĝus el mia seĝo por aplaŭdi ŝtatprezidanton, sed jes ja por la prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, kies opiniojn mi atentege aŭskultis.

Certe ege malfacilas vivi dum periodo en subevoluinta lando, tial en la gastlibro de KEA mi skribis: *«Al la kubanoj mi deziras pli helan estontecon!»*

En la sidejo de KEA mi diskutis kun norvego pri la temo interpreto de la Nova Testamento. Serĉante Bibliion mi surgrimpis faliĝeman bretaron, sed ne povis trovi tiun ĉi libron!

Dum la Konferenco okazis multaj distraj programeroj, kiel kuba danckurso, enkonduko al perkutado (por timigi fantomojn!), kaj diversaj turismaĵoj.

La IKEK-anoj vizitis la Centran Komitaton de la Komunista Partio. Same kiel faris siatempe la prezidanto de la svisa Federacia Konsilantaro al Fidel Castro, ankaŭ ni pledis favore al la observo de la Homaj Rajtoj, kiuj devus esti universalaj. Same kiel en Usono, en Kubo ankoraŭ ekzistas mortpuno.

En Santiago, urbo tre orienta en la Karibia Insulo Kubo, ĉiĉeronis min mia esperanto-amiko. Surbruste li portis ŝildeton *«Gvidanto»*. Fakte li bone plenumis sian funkcion klarigante multon pri sia patrujo. Kun lia esperanto-amiko ni vizitis la

Placon de la Revolucio, kie predikis la Papo antaŭ kelkaj jaroj. En la domaĉo de mia amiko mi dormis rigardate de afiŝa portreto: severe observis min la vatikana estro. Kia koŝmaro! En la kabana loĝejo de mia amiko mi demandadis kubanojn, kion ili opinias pri la multnombraj sloganoj ĉie videblaj? Ili respondis fiere: «*Nu, ni estas komunistoj. Kiel partianoj ni militis en la afrika lando Angolo.*» Kaj ili pozis antaŭ mi kun legitimiloj kaj ordenoj enmane.

En la urbocentro ni renkontiĝis kun du esperanto-klasoj, la unua por la lingvo-komencantoj, la dua por postkomencantoj. Demandite mi volonte rakontis pri la nuna stato kaj pri la historio de nia esperanto-movado en Svislando. Feliĉe mi estis foje sekvinta staĝon pri tiu ĉi temo ĉe KCE.

Per kamioneto ni veturis al la ankoraŭ pli orienta urbo Juanatanamo, el kiu originas la fama kanzono. Ankaŭ tie surprizis min entuziasma esperanto-klaso. Belaj ĉarmulinoj regalis nin per ekzotikaj fruktoj.

Fakte min forte impresis tiu juna, vigla kaj bone organizita esperanto-movado vivanta en mal-facilaj kondiĉoj. Kiu deziras aŭskulti registraĵojn el la radio-programo en esperanto de Radio-Havano, tiu sin turnu al mi.

Dieter ROOKE

Morto

Max-Henri BEGUIN

1918 aprilo 2- 2000 februaro 10

Max-Henri BEGUIN lernis esperanton okaze de sia aktiveco kadre de Servo Civila Internacia. Famille li partoprenis plurajn esperantoaranĝojn, interalie la unuajn restadojn sur la duoninsulo Primoŝten en Jugoslavio, kiujn organizis taĉmento da zagrebaj astronomoj.

En Svislando mem la plej grava poresperanta kontribuo de Max-Henri BEGUIN estis la prelego pri «*Satjagraho hodiaŭ aŭ Aktualeco de aktiva neperforto*», kiun li prononcis la 23an de novembro 1968 en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds kadre de kultura semajnfino internacia honoranta la memoron de Mahatma GANDHI je 20 jaroj post lia mortigo. Lian paroladon, same kiel tiujn de Eric DESCOEUDRES kaj Pierre HIRSCH publikigis poste la revuo «*La Juna Penso*» de la SAT-junularo en aprilo 1971.

Antaŭ ol nekrologe raporti pri la multidimensia aktiveco de Max-Henri BEGUIN, mi unue citos fragmentojn el lia parolado pri neperforto, kiujn mi laŭtlegis en esperanto mem dum lia funebra ceremonio disvolviĝinta en la Kamparana Muzeo de La Chaux-

de-Fonds tuj sekve al lia entombigo.

Jen do esencaj diroj el lia prezento de la aktualeco de neperforto:

«La koloneloj kaj generaloj de ĉiuj armeoj de la mondo transformis nian belan teron, kie estus tiel bone vivi, en municiejon pretan eksplodi. Tio estas nek teoriumado, nek kalumnio de harda kontraŭmilitisto. Tio estas la realaĵo, la frenezo de nia epoko. La milita perforto, kiu regas la historion jam de jarmiloj, nun alvenis en senelirejo. La homaro estas devigata elekti inter la sinmortigo aŭ la rifuzo al la armiloj...

Sed alia forto kontraŭstaras la perforton, estas ĝuste la neperforto. Ĝi reprezentas la solan esperon por nia epoko...

La neperforto, kiun oni ankaŭ povas nomi la senkondiĉan respekton pri la vivo aŭ la fratan amon inter ĉiuj homoj, ne estas novaĵo. Ĝin oni retrovas, kiel konstantan forton latentan en la historio, tiu historio regata kaj premata ĝis nun de la perforto. Verŝajne la neperforto estas tiom olda kiom la homoj. Ĝi estas la faro de uloj mildaj, sentemaj, inteligentaj, homamaj, stampitaj de saĝo nekomprenebla por la plimulto, kiu estas pli brutaj kaj malpli spritaj...

*En la neperforta luktado la kontraŭulo ne estas **venkobatenda** homo, sed homo, kiun oni devas **konvinki**...*

La neperforta luktado postulas internan laboron, kiu celas la purigon, la kreskadon de la nevidebla esto, kiu troviĝas en ni. Ni devas regi la fortojn, kiuj estas en ni: la timon, la malamon, la orgoljlon, la avidon, ĉiajn eblajn apetitojn...

En la perfortaj luktoj, ĉu militaj, ĉu politikaj, la homoj dividiĝas en du grupojn inter si malamikajn, kiuj estas pretaj sin reciproke detrui... En tiuj perfortaj luktoj la homo sin sentas membro de klano, kaj li arogas al si la rajton mortigi la membrojn de la alia klano...

En la neperfortaj luktoj, ankaŭ akraj, la homo restas homo kaj ankaŭ konsideras la kontraŭulon kiel homon. La homaro ne plu estas dividita tiel tranĉe, la neperfortemulo konsideras la kontraŭulon kiel estantan parton de la sama homa tuto. Neniu plu estas mort-kondamnata. Neniu estas forpuŝata. La neperfortemulo konscias, ke ĉiuj homoj kune formas komunecon, familion, en kiu, estas nature, okazas luktoj kaj konfliktoj, sed kie oni sin alfrontas, sciante, ke oni restas fratoj.»

Nur la lastan citaĵon, kiu rilatis al esperanto mem kaj konkludis la paroladon de Max-Henri BEGUIN,

mi ankaŭ francigis. Ĝi estas bela homarana priskribo de esperanto:

«Se mi ŝatas esperanton kaj la mondan esperantistaron, estas ĉar esperanto jam estas la lingvo de tiu homaro, kiu inkluzivas ĉiujn homojn. La esperantistoj havas en si tiun konscion pri la monda civitaneco. Pro tio ili estas la espero al unuiĝinta kaj paca mondo, en kiu la vivo de la homo estos respektata kaj kiu zorgos per kunhelpo, por ke la homoj konu nek plu la militon, nek plu la malsaton, nek plu la mizeron.»

Max-Henri BEGUIN naskiĝis la 2an de aprilo 1918 en la kvartalo La Recorne (kie stariĝis en 1974 Kultura Centro Esperantista) en familio kun 8 gefiloj. Li studis en Le Locle kaj La Chaux-de-Fonds, kie li abiturientiĝis, kaj siajn medicinajn studojn li efektivigis en la universitatoj de Neuchâtel kaj Zürich.

Post la plenumo de la rekruta soldatformiĝo lian medicinan studadon interrompis 11-monata enprizoniĝo en punlaborejo pro lia rifuzo plue soldat-servi. Li eliris tiun punejon grave malsana kaj bezonis trimonatan flegadon en hospitalon por reakiri iom kontentigan bonfarton.

Kvankam lia frato Willy studis teologion, la ekleziaj medioj ne kontraŭstaris al lia kondamno pro militrezistado. Tiam la eklezioj ne emis rezisti al la militspirito. Nur

la kvakeroj helpis lin. Tial lia kristanismo evoluis al kvakerismo, kio renkontigis lin pli intime kun la kvakeraj esperantistoj Pierre CERESOLE, la fondinton de Servo Civila Internacia kaj Edmond PRIVAT, la amiko kaj biografo de Mahatma GANDHI.

Post la konkludo de siaj medicinaj studoj Max-Henri BEGUIN deĵoris dum 2 jaroj en Saarbrücken kadre de laborantaĵo de Servo Civila Internacia, kiu estis ŝargita nutri kaj vesti militviktimaĵojn infanojn per financa helpo de la filantropa fondaĵo «Don Suisse / Schweizer Spende». Estas tiam, ke li konatiĝis kun Violette BEGUIN, lia estonta edzino jam samnoma.

Post tiu laborrestado en Sarrbrücken li fakiĝis kiel infankuracisto en Bern kaj Basel kaj 42-jara li malfermis en 1953 sian praktikojon en La Chaux-de-Fonds. Tie li baldaŭ famiĝis ne nur pro sia neordinara sindonemo profesia, sed ankaŭ pro sciencaj nutradsploroj, kiuj demonstris la misefikon de la rafinitaj sukero kaj farunoj sur la dent- kaj ost-formiĝo kaj la neceson je ekvilibrita nutrado. Lia frato Félix BEGUIN en Winterthur helpis lin fondi firmaon cele al la diskonigo kaj surmerkato de nerafinita kan-sukero: «La Sukero de la Doktoro BEGUIN» dankal kiu miloj da

P.P.

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

infanoj akiris kaj plue akiros senkarian dentaron.

Sed la kuracisto BEGUIN ne nur okupiĝis pri medicino. Interalie lin famigis en la kantono Neuchâtel liaj kampanjoj favore al la protekto de la monto Mont Racine, kiun minacis la kreo de armea ekzercejo. Li ankaŭ organizis la savon de detruotaj farmdomoj, el kiuj unu fariĝis la nun fama Kamparana Muzeo de La Chaux-de-Fonds kaj alia simpatia restoracio kun impona kameno. Lin helpis laborbrigadoj da volontuloj de Servo Civila Internacia kaj de surloke kreskanta apogantaro. Kun tiuj bonvoluloj Max-Henri BEGUIN ankaŭ restarigis la ruiniĝeman muron de la monto Creux-du-Van, kaj okaze de la koncernaj laborrestadoj li ĉiam vokis min, por ke unu vespero estu dediĉita al la prezento de esperanto kaj de ties homaranisma mesaĝo. Dankal li centoj da personoj akiris percepton pri la kultura valoro de esperanto.

La naturprotektaj organizaĵoj, inter kiuj Pro Natura, ankaŭ ricevis de li efikegan helpon kaj

la kantona stratkonstrua fako same kiel la domkonstruaj firmaoj sciis, ke sever-rigarda prezidanto tre atentis kontraŭ difektemo de naturbiotoj aŭ de karakterizaj domoj.

Al Violette BEGUIN, al ŝiaj gefiloj Daniel, Renée kaj Pierre-Ami, kaj al ŝiaj genevoj Pierre-André kaj Joceline, ĉiuj kapablaj legi esperanton, mi esprimas nian dankemon, ke el ilia familio starigis homarano, pri kiu oni certe ne ĉesis paroli en kaj ekster esperantujo.

Claude GACOND

KVINPETALO

Esperanto-Centro

Rue du Lavoir, FR-86410 BOURESSE

☎ kaj faksilo: 0033 549 42 80 74

Kurs-programo

Aprilo 11-15: Lingvostudo kaj pedagogio: Por lertiĝi lingve: strukturŝanĝaj ekzercoj; por kleriĝi literature: antologiaj laŭtleĝaĵoj; por riĉiĝi metodologie: didaktikaj konsiloj, kun Claude GACOND.

18-22: Praktikado de la lingvo. Unuagrada kun Suzanne BOUROT, duagrada kun Marie MALEZIEUX.